# La Riverego

Januaro 2002 | Esperanto-Societo Kebekia | Nro 65, Jaro 16a

# Ne forgesu sendi viajn petleterojn por la 2 kampanjoj

Ni bezonas vian subtenon pri la kampanjoj Radio Kanada Internacia en Esperanto kaj Esperanto-loko nomigo en Montrealo. Ni cetere ricevis pli ol 200 internaciajn apogmesaĝojn pri RKI dum decembro! Jen kelkaj apogmesaĝoj:

**Renato Corsetti, prezidanto de UEA, Italio:**
Mi varme subtenas la dissendojn en Esperanto de la Kanada Radio Internacia. Ĝi estos potenca rimedo por konigi Kanadon eksterlande, ĉar ĉi tie oni scias ĉion pri Usono kaj nenion pri Kanado.

**Sandra Burgues Roca, Urugvajo:**
Estus vera plezuro povi aŭskulti radio-elsendojn de Kanada ! Jam ni povus koni iomete pri tiu granda lando, kiu ŝajnas esti kaŝita pro la grandeco de sia najbaro (Usono). Mi kredas ke Esperanto tre helpos koni reale tiun landon kaj ni scios ke la tieaj kutimoj ne estas la samaj el la anglaparolantoj, kaj francparolantoj, aŭ mi eraras? Vere, oni ĝuos koni Kanadon pere de la Internacia Lingvo Esperanton. Antaŭen ! Bv. nepre informi min kiam komencos la radio-elsendoj.

**Olivier Moreau, Pollando:**
Kiel franco loĝanta en Pollando, mia ĉefa maniero esti informita estas aŭskulti perretajn radio-elsendojn. Ĉar antaŭ 10 jaroj mi studis en la universitato de Sherbrooke, mi tre ŝatus povi aŭskulti denove novaĵojn pri Kebekio kaj Kanado en Esperanto (lingvo de nia familio). Mia edzino estas pola.

**Leland Bryant Ross, Usono:**
Mi ĝojus informiĝi pri la norda najbarego per la Internacia Lingvo, kaj tio multe pli facilus, se RKI dissendus retprogramojn en tiu lingvo.

**Zelimir Pehar, Australio:**
Estus ege bone ke radio-elsendoj el via lando estu ankaŭ en Esperanto.Ni en Melburno jam sukcesis havigi tion por geauskultantoj en Australio kaj pere de la interreto la programoj estas sendataj tutmonde!

**Elmer David Escoto, Honduro:**
Mi estas jam aŭskultanto de Radio Kanada Internacia, de kelkaj jaroj. Kaj nun, se RKI elsendus en Esperanto, mi vere, vere ĝojus! Krome, estas en la mondo multegaj, multegaj esperantistoj, kiuj neniam havis la bonŝancon aŭskulti novaĵojn, komentoj, kurantaj aferoj, ktp en Esperanto. Kaj RKI estas monde konata pro sia profesieco, sendependeco kaj bonegaj vidpunktoj. Ni ĉiuj en Esperantujo vere bezonas tiajn programojn! Al la estraro de RKI: Bonvolu aŭskulti nian peton!

**Efthimios Mavrogeorgiadis, Grekio:**
Mi ĝoje aŭskultus la Esperantajn elsendojn de Radio Kanada Internacia. Mi opinias ke dulingva ŝtato kiel Kanado devas subteni ambiciajn lingvajn klopodojn kiel Esperanto.

**MA Young-tae, Koreio**
Mi estas tre ĝoja, ke eventuale mi povos aŭdi radio-elsendon de vi. Samtempe mi gratulas la novan programon de RKI, kiun certe mi kaj tutmondaj samideanoj bonvenigos.

**Rafael Lins, Brazilo:**
Tre grava estas al RKI, ke ĝi elsendu programojn ankaŭ en esperanto, ĉar ĝi estos aŭskultata en la tuta mondo, pere de internacia kaj neŭtrala lingvo. Mi dankas kaj atendas la momenton aŭskulti RKIn en Esperanto.

**Antonio Sanchez, Kanariaj Insuloj:**
Radio Kanado Internacia, kune kun la BBC kaj aliaj, estas elsendejo ofte aŭskultata de fanatikulo de la radio kiel mi. Kiel esperantisto mi regule aŭskultas kaj aŭskultis dum la pli ol dek jaroj de mia esperantisteco la elsendojn de Radio Polonia, Radio Pekino, k.a. nune per la reto, antaŭe per kurtonda radio-aparato. Estos por mi bonega novaĵo kaj plezuro havi la okazon aŭskulti elsendojn de Radio Kanada Internacia en Esperanto.

**Taesok Choe, Litovio:**
Mia kvarpersona esperantista familio tre ŝatus aŭskulti viajn elsendojn en Esperanto. Mi kredas, ke homoj el la plej multaj landoj ĝoje aŭskultos viajn elsendojn en Esperanto. Eĉ en la malgranda lando Litovio via radio jam havos fervorajn aŭskultantojn. Mi bondeziras plian progreson de via radio kaj plivastan alpaŝon per Esperanto.

# ESK-dankesprimaro

**La ESK sendis bondezirojn okaze de Kristnasko kaj la nova jaro al la subaj homoj. Ili ricevis dulingvan Kristnaskan karton por danki ilin pro ilia kunlaboro en 2001.**

Publikaj homoj : Bernard Bigras, André Boisclair, André Boulerice, Pierre Bourque, Jacques Chagnon, Adrienne Clarkson, Stéphane Dion, Marisa Ferretti Barth, Joan Fraser, Henri-François Gautrin, Louise Harel, Jean Lapointe, Réal Ménard, Lucie Pépin, Jacques Saint-Louis, Lise Thibault kaj Jean-Claude Turcotte.

Ŝtatlaboristoj : Louise Roy (Kanadaj Poŝtoj) kaj Joy Sellers (Radio Kanada Internacia)

Ĵurnalistoj : Josée Boileau (Le Devoir) kaj Jean-François Paradis (CIBL)

Esperantistoj : Yves Bellefeuille (Otavo), Suzanne Caron-Richer (Otavo), Matthew Chisholm (Toronto), Renato Corsetti (UEA), Lise Gonyea (Viktorio), Ralph Gonyea (Viktorio), Paul Hopkins (KEA), Brian D. Kaneen (KEA, Vankuvero) Bill Maxey (NovAnglio) kaj Bob Williamson (Halifakso).

**Venontaj MEK-aktivaĵoj:** 25-an de januaro, 22-an de februaro, 22-an de marto, 26-an de aprilo kaj 31-an de majo.

## Vortoj 2002 de la prezidanto

*Karaj membroj,*

La Esperanto-Societo Kebekia festos sian 20-an jariĝon en septembro 2002. Multege okazis ekde la fondiĝo de ESK kaj mi ŝatus danki ĉiujn kiuj kunlaboris por la progresigo de esperanto en Kebekio kaj en la mondo.
Ni certe ne sukcesis kiel ni volus sed ni ja konstante, jaro post jaro, agadis por informi la publikon, starigi kursojn, organizi lokajn, provincajn kaj internaciajn renkontiĝojn, pretigi ampleksan retpaĝaron kaj multe pli.
Ni povas fieri pri nia movado ĉar ĝi ja laboras por pli bona mondo, pli paca mondo kaj tio estas same necesas nun kiel antaŭ cento da jaroj.
Kiam li alvenas al la esperanto-domo, novulo kiu memlernis esperanton per la reto aŭ helpe de lernolibro, mi daŭre miras ĉar vere esperanto estas memlernebla lingvo.
Ofte novuloj tuj demandos al mi *Kial UNO ne uzas esperanton? Kial la movado ne pli aktive varbas pri la pozitivajn flankojn de la lingvo kaj de la movado?* Nu, nececas multe da varbado por havi iom da rezultoj kaj kun la jaroj oni iom laciĝas ĉiam ripeti la samon...
Tamen, la nuntempa estraro elektita pasintaŭtune viglas kaj aktive laboras je novaj projektoj. Vi ne forgesu ke ni bezonas vin ankaŭ. Sendu al ni viajn ideojn rilate la movado en Kebekio. Partoprenu la kunvenojn kaj proponu vian helpon por la festado de la 20 jariĝo de ESK.
Finante, mi deziras al vi tre bonon kaj belan jaron 2002. Estu la mondo pli pacema...

*Movademe salutas,*
*Normand Fleury*
*prezidanto*

### La SQE a besoin de membres!

Pour soutenir nos efforts pour la diffusion de l'espéranto, nous avons besoin d'appuis d'espérantistes québécois. Vous recevez avec *La Riverego* un dépliant de la SQE. Nous vous invitons à le donner à un sympathisant de l'espéranto en lui suggérant de devenir membre. Vous pouvez aussi inviter vos amis intéressés à l'espéranto à visiter le site web de la SQE : www3.sympatico.ca/esperanto

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2002.04.01**

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury, François Bay kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj François Bay.

Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
jessylapointe@hotmail.com
http://www3.sympatico.ca/esperanto